

## Terminologoj serĉataj

Antaŭ 40 jaroj (1962), tradukante fakan tekston, mi konvinkigis, ke praktikado de Esperanto en mia konstrua fako estas ligita kun (tiam nevenkeblaj) lingvaj problemoj. Izolite en tiu kampo, mi entreprenadis diversajn amatorajn provojn orientiĝi en trovado de nomoj por diversaj teĥnikaj objektoj kaj teĥnologioj. Iom post iom mi propriniciate ekrilatis kun terminologiaj principoj mialande, pere de la ĉefla literaturo kaj tie notitaj referencoj al eksterlanda literaturo, kaj mi venis ĝis la baza verko de *Eugen WÜSTER*\*. Same grava estis la atingo de terminologiaj normoj ellaboritaj en ISO: 704/1968, 860/1968, 919/1969, 1087/1969, 1149/1969 kaj 1951/1970.

Post Kolokvo pri Aplikado de Esperanto en Scienco kaj Teĥniko (KAEST) 2000 en Prago, mi koncize formulis la "Iniciaton por FATO" (= Faka Apliko kaj Terminologio), kadre de kiu mi volas helpi al junaj adeptoj de terminologio kaj aplikado de Esperanto en fakoj ĝenerale (vd. ankaŭ *Scienca Revuo*, Vol. 51 (2000)(4), n-ro 183, p.51)

Helpe de fakaj amikoj kaj la prezidanto de Internacia Sciencia Asocio Esperantista (ISAE) mi nun ankaŭ povas alparoli la legantojn de *Scienca Revuo* kaj proponi komunan klerigadon en la aferoj de faka Esperanto kaj terminologio. Mia ideo estas jena:

a) Koresponda kontaktado kunordigata de mi pere de komunaj leteroj al ĉiuj membroj de la libervola grupo, la membroj reagas per siaj leteroj al mi.

b) Ofteco de la letera kontaktado estas supozata en monata ritmo. Ni povas interkonsenti, ke mi skribos komunan leteron ĉiam post la 1-a de ĉiu monato. Kompreneble, okazaj aktualaj problemoj povos esti traktataj ĉu kolektive, ĉu individue en ajnaj periodoj.

c) La programan procedon mi imagas kiel **korespondan kolokvon** (t.e. scienca diskuto, diskurso; antaŭtempe parta universitata ekzameno) **aŭ seminarion** (t.e. ekzercado kompletiganta universitatajn

\* *Internationale Sprachnormung in der Technik, besonders in der Elektrotechnik (Die nationale Sprachnormung und ihre Verallgemeinerung)*

prelegojn, kurso, kleriga aranĝo). Enkrampe mi notis eksplikojn laŭ enciklopedio. Mi preferas la formon de kolokvo, diskurso. La nocio "diskurso" en PIV estas erare malvastigita al "politika parolado". Diskurso estas laŭ mia opinio scienckarakterata diskuto. Cetere, tion elvokas la ekspliko ĉe la vorto "diskursiv/a" en PIV: (*pp penso*) *Atinganta scion per rezonado kaj intelektaj procedoj; ĝi estas malo de la intuicia penso.* - Mi elektos temojn por la tempodaŭro de ĉirkaŭ 2 jaroj unue el la teorio de terminologio, due el la teorio de la lingvo Esperanto, nome partojn gravajn por terminelekto. Mi pere de kelkaj frazoj poparte eksplikados principojn kaj metos por vi demandojn, je kiuj vi respondu aŭ rezonu per ekspliko de via propra opinio. La diskuto poste vastiĝos al sekvontaj leteroj, je ĉiu problemo povos reagi ĉiuj membroj de nia grupo.

d) En la teorio de terminologio ni sekvos la paŝojn:

- limigi la analizotan fakon,
- determini (elekti, identigi) la aron de nocioj,
- klasifiki la nociojn,
- difini la nociojn,
- nom(um)i la nociojn.

e) En la teorio de Esperanto ni dediĉos tempon precipe al la studo de vortkategorioj kaj vorfarado, kiuj rekte ligiĝas al la procedo de elektado de nomoj por unuopaj nocioj. Ni sekvos la metodojn:

1. morfologian metodon
  - a) per derivado helpe de afiksoj,
  - b) per kunmetado,
  - c) per mallongigado;
2. sintaksan metodon - formadon de terminaj vortgrupoj;
3. semantikan metodon, kiu agas per
  - a) precizigado de signifoj ĉe vortoj komunuzaj,
  - b) metafora kaj metonimia transportado de vortsignifoj;
4. elpruntadon de vortoj el fremdaj lingvoj.

g) La baza rekomendata literaturo:

*Wüster, E.*: Konturoj de la lingvonormigo en la teĥniko. *Dansk Esperanto-Forlag*, 1975.

*Kalocsay, K. & G. Waringhien*: Plena analiza gramatiko de Esperanto, UEA 1980.

*Drezen, E.*: Pri problemoj de internaciigo de science-teĥnika terminaro. *A.E.Iltis*, 1983.

Werner, J: Terminologia kurso. SK ROH Rooudnice n.L., 1986;  
 Suonuuti, H: Terminologia gvidilo. UEA 1998. (La libro de *Wüster* jam ne plu estas aĉetebla, verŝajne ankaŭ la verko de la aŭtoro duopo *Kalocsay/Waringhien* elĉerpiĝis. La ceteraj estas akireblaj en la Libro-Servo de UEA).

h) Mi intencas resumi ĉiun programan parton post la komuna pritrakto kaj tiel prepari studtekston por eventualaj pluaj interesigantoj pri terminologio.

i) Paralele kun la **promeno tra la teoria bazo de terminologio** kaj de **faka Esperanto**, mi ŝatos iom okupi vin per via propra analizado de viaj temoj, ligitaj al via profesio kaj interesoj.

j) Mi povos trovi kaj kopii por vi specimenojn de interesaj tekstoj, kiuj rilatas al nia komuna temo.

k) Mi konsideras, ke estus utile post unu aŭ du jaroj, ferie 2003 aŭ 2004, ie renkontiĝi kaj preparoli la akiritajn spertojn, pritrakti dezirindan frontadon de la nuna situacio en normigado de terminarioj kaj eventuale la strategion de ĝenerala progresado de esperanta terminologio ankaŭ lige al la fakaj organizaĵoj esperantistaj kaj ankaŭ al la aktivecoj internaciaj (ISO k.s.)

l) Mi ŝatas de vi ricevi informon pri via profesio aŭ studata fako, krome naskiĝjaron. Mi deklaris, ke mi volas organizi edukon de junaj terminologoj, sed la junaĝon mi intence neniel limigis. Juna ja povas senti sin ankaŭ jam grizhara homo.

Fine mi notas, ke mi ĝojus pri la montro de via intereso, ke vi partoprenos la kolokvon laŭ viaj ebloj. Se vi havos tempomankon pro viaj devoj, kompreneble vi povos en la kontakto paŭzi, la partopreno ja estas libervola. Se en via ĉirkaŭo estas aliaj personoj, kiuj volas partopreni en nia kleriĝado terminologia, nepre al mi anoncu ties adresojn: mi invitos ilin kunlabori en nia rondo.

Jan Werner  
 Dřinová 18  
 CZ 612 00 Brno  
 ĈEĤIO

## Alternativaj alfabetoj

Pro la presaj problemoj de la supersignitaj literoj (konsistigantaj nur 2,38% de Esperantaj tekstoj) *Zamenhof*, ne sufiĉe pripensinte, jam en 1888 kreis la **hoan alfabeton** (laŭ *Albault*: "**Fundamenta Help-Alfabeto**" **FHA**) kun ch, gh, hh, jh, sh kaj u anstataŭ la supersignitaj literoj kun ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ kaj ŭ de la **Fundamenta Alfabeto (FA)**. Pro ambiguelo (fakte: kontraŭfundamenteco) FHA neniam populariĝis, do dum la pasintaj 114 jaroj pli ol cent alternativaj alfabetoj estis proponitaj por eviti la aplikon de la ses supersignitaj literoj (kiuj troviĝas en neniu nacia alfabeto, do fakte estas malinternaciaj literoj en internacia lingvo) kaj tiel, aŭ alimaniere, doni al la alfabeto "pli internacian" karakteron.

Ĉirkaŭ 70% de la proponoj naskiĝis en la komputila epoko (50% en la lasta jardeko). Nun en la modernaj komputiloj la softvaro Unikodo (*Unicode*), enhavanta ankaŭ la Esperantajn supersignitajn literojn, estas fabrike instalita. En ĉiu (ankaŭ) latinlitere skribanta lando (kaj en multaj aliaj) oni povas aĉeti komputilojn kun klavaro enhavanta la 26 sensignajn "anglatinajn" plus la signitajn kaj aliajn specialajn literojn de la loka lingvo. Kapablago de la nacialfabela klavaro pri kutima aperigo kaj sendo de aliaj (ekz. Esperantaj ĉapelitaj) literoj el la instalita Unikodo bezonas plusan laboron aŭ koston, kion eble oni devos ripeti, se la literoj hazarde forviŝiĝas.

Ne atingeblas la sama grandega kaj ĉiam kompletigata sortimento de literotiparoj, kiel por la anglatinaj 26 literoj. Povas esti pluaj problemoj, se la softvaroj de la interkomunikantaj komputiloj apartenas al malsamaj komercaj markoj (*Microsoft*, *Macintosh* kaj aliaj). Tial granda parto de la alfabeto-proponantoj klopodas signi la 28 Esperantajn fonemojn per uzo de ĉiuj 26 anglatinaj literoj, do ankaŭ q, w, x, y (unue *René de Saussure*, 1920), sed sen la diakritaj. Granda grupo de la proponantoj tamen timas apliki q, w, x kaj y, ĉar tiu trovas ilin konvenaj por neniu el la esperantaj fonemoj. Ili plejparte enkondukas digramojn (parte la supre cititajn hoajn digramojn el FHA kaj aliajn). Tial la tekstoj plilongiĝas.

Troviĝas proponoj, kiuj ne nur la supersignitajn literojn, sed ankaŭ aliajn volas ŝanĝi. Estas ankaŭ tiaj, kiaj eĉ uzas fundamentajn literojn